# La komunuma veksilologio en Ĉeĥio

*Jiří* PATERA

## Enkonduko

Veksilologio estas la scienco pri flagoj aŭ, unuvorte, "flag-scienco". La termino devenas el la latina vorto *vexillum* (diminutivo de *velum* = velo, kiu estis la standardo de romiaj legianoj) kaj el la greka vorto *logos* = vorto. La flagscienco estis origine parto de la heraldiko – la scienco pri blazonoj, sed dum la kresko de nombro kaj signifo de flagoj, la flagscienco memstariĝis sub la nomo "veksilologio".

## Blazonoj kaj flagoj en la komunisma kaj postkomunisma periodoj

En la Ĉeĥa Respubliko la heraldiko kaj ankaŭ la veksilologio havas longan tradicion, sed dum la komunisma reĝimo la du sciencoj ne estis alte taksataj. Blazonoj estis konsiderataj "historiaj mezepokaj ornamaĵoj" kaj flagoj estis principe nur "ŝtataj kaj laboristaj", t.e. ruĝaj aŭ sovetuniaj. Tolerataj estis ankaŭ flagoj de fabrikoj kaj de sportaj organizaĵoj. Urbaj flagoj estis hisataj nur sporade, ekz. en la ĉefurbo inter la ĉeĥoslovaka kaj sovetunia flagoj de tempo al tempo aperis ankaŭ la flava kaj ruĝa flago de Prago.

Sed post la politikaj ŝanĝoj en la jaro 1989 okazis ŝanĝoj ankaŭ en la aprezado kaj rekonado de blazonoj kaj flagoj kiel simboloj kaj indentigiloj de urboj kaj komunumoj. Ĝis tiam proprajn blazonojn kaj flagojn rajtis havi nur urboj, sed la 4-an de septembro 1990 la Ĉeĥa nacia konsilantaro akceptis la leĝon n-ro 367/1990 de *"Kol."* (Kolekto de leĝoj) pri komunumoj (Komunuma Ordo), kiu komencis validi post la komunumaj balotoj la 23-an kaj la 24-an de novembro 1990. Laŭ §5 de tiu ĉi leĝo la komunumoj, kiuj ĝis tiam ne posedis blazonon aŭ flagon, havis la rajton tiujn ĉi simbolojn ricevi.



Post la konstituiĝo de Ĉeĥa Respubliko la 1-an de januaro 1993 la rajton al komunumoj uzi propran blazonon kaj flagon donas la Deputita Ĉambro de la Parlamento de Ĉeĥa Respubliko. Dume ekvalidis novaj leĝoj, kaj nome de la n-ro 128/2000 de *Kol.* pri komunumoj kaj de la n-ro 129/2000 de *Kol.* pri regionoj kaj fine la tute nova leĝo n-ro 216/2004 de *Kol.* pri komunumoj, regionoj kaj la ĉefurbo Prago.

Sed ĉiuj ĉi leĝoj enhavas la senŝanĝan paragrafon, rajtigantan la komunumojn (t.e. urbojn kaj vilaĝojn), regionojn kaj Pragon posedi proprajn simbolojn, t.e. blazonojn kaj flagojn. Eblas konstati, ke ekde la komenco de la jaro 1991 ĝis la fino de la jaro 2004 estis oficiale aprobitaj pli ol 2430 blazonoj kaj 2720 flagoj.

## Paŝon post paŝo

La procedo de konfirmado de blazonoj kaj flagoj de komunumoj okazas laŭ kelkaj paŝoj. La unua paŝo konsistas en tio, ke la komunuma estraro proklamas publikan konkurson pri simboloj de la komunumo, aŭ alparolas konkretan kapablan personon en la komunumo.


La duan paŝon prezentas la elekto kaj aprobo de la proponoj de simboloj fare de la komunuma estraro. Poste sekvas la tria paŝo, dum kiu la urbestro aŭ vilaĝestro forsendas petskribon pri la aprobo de la simboloj kun ilia projekto al la Deputita Ĉambro de la Parlamento de Ĉeĥa Respubliko. Tie la proponoj estas prijuĝataj kaj diskutataj en "Subkomitato por la heraldiko kaj veksilologio", kiu konsistas el fakuloj pri tiuj ĉi sciencoj. Oni kutime prijuĝas 50 ĝis 70 proponojn samtempe.

En la Subkomitato estas rifuzitaj jenaj proponoj, kiuj ne estas akcepteblaj – ĉu pro interŝanĝebleco kun iuj jam aprobitaj simboloj, ĉu pro tio, ke ili ne konvenas al la heraldikaj kaj veksilologiaj principoj pri proponado de blazonoj kaj flagoj. Por ak-


## Kelkaj specimenoj de ĉeĥlandaj komunumaj flagoj




**SUŠICE**
(okr. Uherské Hradiště)
45/2004, 05.10.2004



**SVATAVA**
(okr. Sokolov)
45/2004, 05.10.2004



**SVOJŠICE**
(okr. Pardubice)
37/2004, 08.06.2004



**SVOJŠÍN**
(okr. Tachov)
37/2004, 08.06.2004



**ŠTĚDRÁ**
(okr. Karlovy Vary)
37/2004, 08.06.2004



**ŠTĚPÁNOVICE**
(okr. Brno-venkov)
34/2004, 27.02.2004




**ŠUMICE**
(okr. Uherské Hradiště)
45/2004, 05.10.2004




**TETÍN**
(okr. Beroun)
34/2004, 27.02.2004



**TICHÁ**
(okr. Nový Jičín)
45/2004, 05.10.2004



**TRNAVA**
(okr. Třebíč)
34/2004, 27.02.2004



**TRPÍK**
(okr. Ústí nad Orlicí)
33/2004, 11.02.2004



**TUHAŇ**
(okr. Česká Lípa)
34/2004, 27.02.2004



**TUHAŇ**
(okr. Mělník)
45/2004, 05.10.2004



**TUCHOŘICE**
(okr. Louny)
34/2004, 27.02.2004



**TURKOVICE**
(okr. Pardubice)
45/2004, 05.10.2004



**TURSKO**
(okr. Praha-západ)
37/2004, 08.06.2004




**ÚJEZDEC**
(okr. Uherské Hradiště)
45/2004, 05.10.2004



**URBANICE**
(okr. Hradec Králové)
45/2004, 05.10.2004




**ÚSILOV**
(okr. Domažlice)
45/2004, 05.10.2004




**VALAŠSKÉ PŘÍKAZY**
(okr. Vsetín)
34/2004, 27.02.2004



Sub la nomo de la komunumo estas enkrampe la koncerna distrikto, sube la numero de aprobo de la flago kaj la dato, ekde kiam ĝi validas



**VÁPENNÁ**
(okr. Jeseník)
45/2004, 05.10.2004



**VAVŘINEC**
(okr. Blansko)
45/2004, 05.10.2004



**VELIŠ**
(okr. Jičín)
45/2004, 05.10.2004




**VELKÁ CHMELIŠTNÁ**
(okr. Rakovník)
45/2004, 05.10.2004



**VELKÝ VALTINOV**
(okr. Česká Lípa)
37/2004, 08.06.2004



**VĚLOPOLÍ**
(okr. Frýdek-Místek)
37/2004, 08.06.2004



**VESELÝ ŽĎÁR**
(okr. Havlíčkův Brod)
34/2004, 27.02.2004



**VINCENCOV**
(okr. Prostějov)
45/2004, 05.10.2004



**VOJKOVICE**
(okr. Mělník)
37/2004, 08.06.2004



**VRČEŇ**
(okr. Plzeň-jih)
45/2004, 05.10.2004




**VÝPRACHTICE**
(okr. Ústí nad Orlicí)
34/2004, 27.02.2004




**VYSOKÁ PEC**
(okr. Chomutov)
37/2004, 08.06.2004



**VYSOKÉ NAD JIZEROU**
(okr. Semily)
34/2004, 27.02.2004



**VYŠKOV**
(okr. Vyškov)
34/2004, 27.02.2004



**VÝŠOVICE**
(okr. Prostějov)
45/2004, 05.10.2004



**ZÁLŠÍ**
(okr. Ústí nad Orlicí)
45/2004, 05.10.2004



**ZAVIDOV**
(okr. Rakovník)
45/2004, 05.10.2004



**ZBRASLAVEC**
(okr. Blansko)
37/2004, 08.06.2004



**ZICHOVEC**
(okr. Kladno)
45/2004, 05.10.2004



**ZLATNÍKY-HODKOVICE**
(okr. Praha-západ)
34/2004, 27.02.2004

cepteblaj proponoj estas formulata la ĝusta heraldika kaj veksilologia priskribo de la simbolo. La laborrezulto de la Subkomitato estas pritraktata en kunveno de la Komitato por scienco, edukado, kulturo, junularo kaj korpoedukado, kaj per rezolucio pri la agado de la Subkomitato por la heraldiko kaj veksilologio la Komitato esprimas aprobon al la proponoj de blazonoj kaj flagoj kaj rekomendas al la prezidanto de la Deputita Ĉambro, ke li laŭ la leĝo pri komunumoj (Komunuma Ordo) atribuu al la komunumoj nomitaj en la rezolucio la rajton uzi blazonon aŭ flagon. Surbaze de tiu ĉi rezolucio la prezidanto de la Deputita Ĉambro per sia decido atribuas la simbolojn al la komunumoj. La solena akto de la enmanigo de la simboloj al la urbestroj kaj vilaĝestroj okazas en la salonego de ŝtataj solenaĵoj de la Deputita Ĉambro. Ĉe tiu okazo la prezidanto de la Deputita Ĉambro eldiras mallongan paroladon.

## Kriterioj pri flagoj

Laŭ veksilologiaj fakuloj dum la prijuĝado de unuopaj proponoj de urbaj aŭ vilaĝaj flagoj oni aplikas jenajn kriteriojn:

1. La proporcio de la larĝo al la longo de la flagotuko devas esti la sama kiel ĉe la ŝtata flago, do 2 : 3.
2. La tuko de la nova flago ne povas esti la sama kiel la tuko de jam ekzistanta flago en Ĉeĥa Respubliko, eventuale ankaŭ en Slovaka Respubliko.

Tiu ĉi kriterio ne estis obeata en la pasinteco. Tial ekz. la flagon kun la du flava kaj ruĝa (ora kaj ruĝa) horizontalaj strioj havas ne nur la ĉefurbo Prago, sed ankaŭ la sudbohemia urbo *České Budějovice* kaj la moraviaj urboj *Olomouc* kaj *Znojmo*. Simile ekz. la blankan kaj bluan (arĝentan kaj bluan) horizontalajn striojn havas la flagoj de la urboj *Beroun*, *Česká Lípa, Domažlice, Kolín, Mladá Boleslav, Náchod* kaj *Teplice* kaj la pragaj kvartaloj Malgranda Urbo (*Malá Strana*) kaj *Hradčany*.

3. Nova flago ne rajtas aspekti kiel jam ekzistanta ŝtatflago.



4. La koloroj de nova flago devas origini el koloroj de la blazono de la komunumo, sed ili povas esti limigitaj nur al bazaj koloroj. Sed estas akceptebla ankaŭ flago kun aliaj koloroj ol tiuj en la blazono, se tiu flago havas rilaton al la historio de la komunumo aŭ se ĝi estis uzata jam iam en la pasinteco.
5. Principe oni ne aprobas flagon, kies tuko estas kompletigita per la ŝildo de urba blazono, ĉar tiam okazus superflua duobligo de la komunumaj simboloj. Sed unuopajn figurojn el la blazono oni rajtas uzi.

Tamen ankaŭ tiu ĉi principo ne estis obeata en la pasinteco. Tial iuj historiaj urbaj flagoj enhavas la blazonŝildon por diferenci de aliaj urboflagoj. Ekzemple la blanka kaj blua flago kun ŝildoj apartenas al la urboj *Chomutov, Jičín* kaj *Kladno*.

6. Sur komunuma flago devas ne aperi surskribo, teksto, slogano, realisma bildo kaj ĉio, kio malhelpas la reciprokan distingon de malsamaj flagoj.
7. Kiam oni povas elekti el kelkaj variantoj, tiam oni preferas la proponojn veksilologie pli konvenajn laŭ la aspekto kaj flagrado.
8. La frontflanko kaj la dorsflanko de la flagotuko devas esti identaj. Kiam oni aprobis la t.n. heraldikan aspekton de la flago, t.e. kiam la blazonfiguroj situas sur la tuta tuko de la flago, tiam en la priskribo necesas prezenti la situon de la figuroj sur la dorsa flanko aparte.
9. Ne estas diferenco inter la komunumaj flago kaj standardo laŭ la aspekto kaj laŭ la proporcio de la flankoj.
10. La flagotuko devas esti unusignife priskribebla per vortoj tiel ke ĝi povu esti pretigita sen grafika modelo.

La kompleta superrigardo de ĉiuj flagoj de la komunumoj en Ĉeĥio ekde 1991 estas ĉiujare publikigata en apartaj kajeroj de "Veksilologia Leksikono", eldonataj de Centro de veksilologiaj informoj en la urbo *Hradec Králové*.

## Resumo

Laŭ la leĝo pri komunumoj n-ro 367/1990 de "Kolekto de leĝoj" ĉiuj civitoj (urboj kaj vilaĝoj) havas la rajton posedi propran blazonon kaj flagon, sekve la civitoj, kiuj tiujn ĉi simbolojn ne posedas, havas rajton ilin akiri. La proponojn de la civitoj pritraktas la Subkomitato por la heraldiko kaj veksilologio de la Komitato por la scienco, edukado, kulturo, junularo kaj korpa edukado de la Deputita ĉambro de la Parlamento de la Ĉeĥa Respubliko, kaj la aprobitajn simbolojn ties prezidanto enmanigas al la civitestroj dum aparta solena akto. Ekde la jaro 1991 ĝis la fino de la jaro 2004 estis oficiale atribuitaj 2430 blazonoj kaj 2720 flagoj.

## Resumo ĉeĥlingva

*Podle zákona o obcích č 367/1990 Sb. všechny obce (města a vesnice) mají právo mít vlastní znak a vlajku, takže ty obce, které tyto symboly nemají, jsou oprávněny je získat. Návrhy obcí projednává Podvýbor pro heraldiku a vexilologii Výboru pro vědu, vzdělání, kulturu, mládež a tělovýchovu Poslanecké sněmovny PČR a schválené symboly předseda PS PČR uděluje starostům obcí při zvláštním slavnostním aktu. Od r. 1991 do konce r. 2004 bylo oficiálně uděleno 2430 znaků a 2720 vlajek.*


## Literaturo


*Exner P.* (2005): *Vexilologický lexikon, vlajky obcí ČR (2004, 1.část, 2.část). – Středisko vexilologických informací. Hradec Králové.*

*Klement J.* (1979): Heraldiko-veksilologio. Terminaro en Esperanto. – EK La Progreso. *České Budějovice.*

*Mucha L.* (1974): *Vlajky a znaky zemí světa. 216 p. – Geodetický a kartografický podnik v Praze, n.p.*

*Patera J.* (2002): 30 jaroj de la Veksilologia klubo en Prago. – MONATO, oktobro 2002, p.23, *Augsburg.*

*Svoboda E.* (1969): *České městské a obecní prapory. – Sborník přednášek z. 1. českého vexilologického kongresu, Hradec Králové.*



## Adreso de la aŭtoro

*S-ro Jiří Patera*
*U Ryšánky 1534 / 21*
*CZ – 147 00 Praha 4* / ĈEĤIO


## Priaŭtora informo

La aŭtoro estas vicprezidanto de Esperantista klubo en Prago kaj redaktoro de la kluba Bulteno. Li estas aparte interesata de diverslandaj flagoj kaj blazonoj, kiuj siaspece prezentas internacian komunikilon simile kiel piktogramoj, trafiksignoj kaj aliaj.



# Pri la zoologia sistematiko

*Rüdiger* SACHS

## Enkonduko

Jam en antikvaj tempoj zoologoj kaj botanikistoj klopodis por ordigi la vivestaĵojn – bestojn kaj plantojn – en sistemon, por orienti sin en la preskaŭ ne plu superrigardebla formoabundo de la animala kaj vegetala regnoj. Tiuspecan sistemon oni certe povas starigi laŭ tute diversaj vidpunktoj. Ekde la tempo de *Charles* DARWIN (1809–1882) kaj liaj antaŭaj kaj postaj "samideanoj" pri la teorio, ke ĉiuj vivestaĵoj evoluis el komunaj praspecioj, oni tamen disdividas la plantojn kaj bestojn laŭ ilia "natura parenceco".

Nia scio pri la filogenezo kaj, pro tio, pri la konjektebla sangsanga parenceco multiĝas de jaro al jaro pro novaj malkovroj kaj ekkonoj, pruv- kaj konfirm-metodoj, precipe la genteĥniko. Malnovaj konceptoj estas anstataŭigataj per pli novaj, pli aplikeblaj, do per "pli ĝustaj". Tial la natura sistemo de la animala kaj la vegetala regnoj estas submetata al ŝanĝoj – ofte ne nur malgrandaj.

La opinioj (kaj interpretado de certaj komunaj ecoj kun selva "fina decido" pri deveno kaj origino) inter sistematike laborantaj zoologoj pri la aparteneco de certa bestoformo al certa parencecgrupo estas nek unuecaj nek stabilaj. Pri tio suferas ankaŭ la parazitologo, kiu okupiĝas pri anatomie kaj fiziologie tiom "reduktitaj" specioj, ke ilia parenceco kun praspecioj (kiuj eble ankoraŭ ne vivis parazite) estas apenaŭ rekonebla. Parazitoj ja estas vivoformoj, kies "normalaj" organoj (laŭ kiuj kelkaj vivaĵoj estas konsiderataj parencaj) malaperis, ĉar ne plu estas bezonataj ties funkcioj dum la parazita vivoformo.